

Heinrich Heine,  
The Lorelei

*tradukita de Mark Twain*

*An ancient legend of the Rhine*

I cannot divine what it  
meaneth,  
This haunting nameless  
pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through  
my brain:

The faint air cools in the  
gloaming,  
And peaceful flows the  
Rhine,  
The thirsty summits are  
drinking  
The sunset's flooding wi-  
ne;

The loveliest maiden is sit-  
ting  
High-throned in yon blue  
air,  
Her golden jewels are shi-  
ning,  
She combs her golden hair;

She combs with comb that  
is golden,  
And sings a weird refrain  
That steeps in a deadly en-  
chantment  
The listener's ravished  
brain:

...

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

*Tiu traduko estas po-  
ste iom modifita de ali-  
uloj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Vespero jam ekmal-  
heliĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kro-  
nas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial sub-  
ita  
malgaj' en la koro na-  
skiĝis;  
el tempo jam enterigi-  
ta  
legendo al mi revi-  
viĝis.

Jam malvarmetiĝas l'  
aero,  
la Rejno mallaŭte ba-  
bilas,  
per oro de l'sun' en  
vespero  
la supro de l' monto  
rebrilas.

Plej belan knabinon  
mi vidas:  
en ora ornamo brilan-  
te,  
sur supro de l' monto  
ŝi sidas,  
la harojn mistere  
kombante.

La oran kombilon ŝi  
movas  
kaj kantas tra l' pura  
aero,  
kaj forto mirinda sin  
trovas  
en tiu ĉi kant' de  
l'vespero.

...

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N.  
01*

Ignoro, quid id sibi  
velit,  
Tristissimus cur  
sim,  
Antiqui aevi fabel-  
lam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frige-  
scit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lu-  
cescit,  
Dum Phoebus occi-  
dit.

Sedet in summo  
montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma  
frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine  
pectit,  
Carmen canens pro-  
cul,  
Mirandum id habet  
modum  
Nec non virilem si-  
mul.

...

The doomed in his drifting shallop, Is tranced with the sad sweet tone, He sees not the yawing breakers, He sees but the maid alone:	Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priententas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ektremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos ille, Ocli non si sursum vident.
--	--	--	--

The pitiless billwos engulf him!- So perish sailor and bark; And this, with her baleful singing, Is the Lorelei's gruesome work.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kantado.	Opinor undas devorare Nautam cum navicula, Effecit solo canendo Lurleia id dea.
--	--	--	--

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13  
04:42:59)

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03  
19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30  
16:15:09)

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11  
14:00:52)